
# *Havano bonvenigas la delegitojn al la 8-a kongreso de la komunista partio*




**8-a kongreso de la komunista partio**

Havano, apr 15 (RHK) Delegitoj el sep provincoj jam alvenis al Havano por partopreni la laborsesiojn de la 8-a kongreso de la komunista partio de Kubo (PCC), kiu komenci?os ?i-vendrede en la Kongresa Palaco de tiu ?i urbo.

Temas pri delegitaroj devenantal el la kvin orientaj provincoj, krom la centraj Camagüey kaj Ciego de Ávila. En ?iuj kazoj oni rigore sekvas la sanitarajn procedurojn truditajn de la pandemio de Kovim-19.

La kongreso okazos de la 16-a ?is la 19-a de aprilo. Inter la ?efaj punktoj de la tagordo estas pritaksi la ekonomiajn kaj sociajn rezultojn atingitajn dum la lasta jarkvino kaj la anta?vidojn por la estonteco.

La gvida tasko dum tiu ?i periodo estis esprimita dum la 7-a kongreso okazinta en aprilo de 2016. Dum tiu grava evento, la unua sekretario de la partio, la generalo de armeo Raúl Castro asertis ke “la procezo por aktualigi la ekonomian modelon komencitan en la sesa kongreso, ne estas tasko por unu a? du jarkvinoj. La vojo jam estas markita.”

?uste tial, post la sepa kongreso, de 2017, oni iniciatis novan etapon.

Tiamaniere, la delegitoj al la venonta evento pritraktos ?iujn agojn plenumitajn tiucele. Indas elstarigi ke ?is 2016 estis kreitaj ?iuj bazoj por iniciati mondordigon de la insulo kaj oni alpa?is por evoluigi la diversajn ekonomiajn rolantojn.

La periodo de 2016 ?is 2021 oni aprobis politikojn kaj decidojn por okazigi la landan monan ordigon, kiu estas tre kompleksa ?ar trapasas ?iuj sferojn de la vivo.

fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/254156-havano-bonvenigas-la-delegitojn-al-la-8-a-kongreso-de-la-komunista-partio

**Radio Habana Cuba**